


---

# STARTO

---

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO 1974 2 (40)



La konata restadejo en Międzygórze, Pollando

F. Branislav : **P A C O**

/el la poemo/

Ci vorton skribu en la koron !  
Ĝi eldirita unu horon,  
printempon ŝutos el la mano  
de fruktoarb' en floraj belo  
en kanton de virin', infano,  
al viraj polmoj kaj marteloj.  
Kaj suno estos radionta  
por tiu vorto al spac' tutmonda.

Ci vorton skribu en la koron !  
Ĝi ligas kun popol' popolon.  
Super kanonoj vort' ĉi venkas,  
vokas : al amikec' ni startu.  
Ne plu divide ĝi silentas  
fremdlingve. Gardu pacon, gardu !  
Kaj tuta mondo kaj homaro  
por ĉiam tenos, pacremparon !

Esperantigis Jiří Kořínek, 1964



# Al la pacmovada jaro

La planon por 1974, la jubilea jaro de la ĉs.kaj tutmonda pacmovadoj, pritraktis la komitato de la Porpaca sekcio de ĈEA, kunsidinte la 11-an de marto en Prago.

La sekcio jam preparis eldonon de speciala n-ro de PACO, plue estas preparanta migrantan ekspozicion kun porpaca temaro, distribuon de prelegoj pri Esperanto kaj MEM por LG ĈEA kaj eldonon de glumarko/111 mil ekz./ kun Esp. kaj ĉeĥa tekstoj. Sekvos pluaj aktivecoj kunlabore kun la Ĉeĥa Packonsilantaro kaj kun la frata sekcio de AE SSR.

Inĝ.F.Sviták informis, ke la asocia estraro kandidatigis kiel novan ĝeneralan sekretarion de MEM anstataŭ la forpasinta T.Balda, k-don D. Kočvara, vicprez. de ĈEA, kaj la prezidantecon de la ĉeĥa porpaca sekcio ĝi komisiis al O.Kníchal, komitatano de ĈEA.

La sekcia komitato alvokas ĉiujn grupojn kaj pacaktivulojn en ĈSR antaŭvidi en siaj respektivaj planoj porpacajn aktivecojn, kontaktante la distriktajn kaj regionajn packonsilantarojn, daŭre varbi por la revuo PACO, popularigi MEM kaj ties atingojn kaj informi la sekcion pri sia agado. /kni/

## Do Hamburku jen individuálně!

Koncem loňského roku požádal sekretariát Svazu Správu zahraničního cestovního ruchu o zařazení zájezdu na Světový esperantský sjezd v západoněmeckém Hamburku do plánu zahraničních cest v roce 1974. Odpověď oddělení kongresové turistiky ze dne 11.2., kterou podepsal dr. J. Macourek, je bohužel záporná. Vyjímáme z ní podstatnou část:

Důvodem našeho negativního stanoviska je skutečnost, že plán devizových prostředků na rok 1974 byl našemu úseku natolik zkrácen, že stávající stav deviz umožňuje pokrýt pouze požadavky tří velkoodběratelů, s nimiž úsek kongresů spolupracuje při realizaci mezinárodních kongresů v ČSSR.

Vzhledem k celospolečenskému významu tohoto kongresu zařadili jsme vaši objednávku na čekací listinu. Potvrzení vaší objednávky je odvislé od eventuálního zvýšení plánu devizových plateb, které jsme po vyhodnocení neumístěných objednávek nárokovali.

Současně vás upozorňujeme, že uskutečněné zájezdy do NSR musí být odsouhlaseny místopředsedou vlády ČSSR.

Naši členové se tedy budou moci zúčastnit kongresu pouze individuálně a pod podmínkou, že jim SBC poskytne nezbytné devizové prostředky.

## LA ĈEFDELEGITO KOMUNIKAS

Kiel la individuaj membroj de UEA jam spertis, estas - laŭ interkonsento inter UEA, ĈEA kaj mia la revuo Esperanto kaj la Jarlibro 1973, Dua Parto, ekspeditaj de UEA en registritaj pakajoj al la sekretariejo de ĈEA. De tie mi aranĝas la distribuon al la koncernaj membroj.

Tiu ĉi maniero estos daŭrigata dum la tuta jaro 1974. Eventualajn demandojn, nur rilate al la membro de UEA aŭ reklamaciojn, bonvolu do direkti al mia adreso.

La ceterajn aferojn, inkluzive de

vendado de libroj kaj aliaj esperantaĵoj prizorgos la sekretariejo.

inĝ.F.Sviták, ĉefdelegito de UEA

DEK NOVAJ LG. La estrara kunsido aprobis la 2a de febr. dek Esp.rondetojn kiel lokajn grupojn de ĈEA /en Teplice, Příbor, Miletín, Gottwaldov, Jablonec, Herbortice, Opava, H.Brod, Ústí n.L./

PROSPEKTOJN kaj priekskursajn informojn rilate al Hungario disponigas J.V.Otta, Raškov 95, 789 64, Bohdíkov, okr. Šumperk.



## Rondeta vivo

**B R N O** - 41 klubvesperojn okazigis la LG en 1973. El ili 4 estis dediĉitaj al aktuala politika problemaro, 2 al ĝenerale kulturaj aferoj, 9 al literaturo kaj artoj, 8 al scienco kaj tekniko, 3 al vojaĝpriskriboj, 6 al Esp.aktualaĵoj, 4 al amuza programo kaj kvar filmvesperoj.

Al la urbaj redakcioj la LG-prezidanto dissendis entute 117 informleterojn.

**Ĉ. B U D Ě J O V I C E** - LG "La Progreso" aranĝis porkomencantan kurson kun 12 partoprenantoj, kiu dauros ĝis junio ĉijara.

**Ĉ. T Ř E B O V Á** - EK Amikeco, kies preskaŭ ĉiuj anoj membriĝis al ĈEA kaj al ĝia Fervojista sekcio, okazigis la 2an de febr. jam la 5an Esp.-balon. Partoprenis ĉ. 400 personoj, inter ili gastoj el aliaj ĉeĥaj urboj kaj eksterlando /GDR, Hungario/, En decembro la EK aranĝis la Zamenhofan solenaĵon k la tradician Esp. Silvestron.

**O S T R A V A /VŽKG/** - La unua Esp. balo en Vítkovice /2.3.1974/ renovigis la tradician kutimon, per kiu oni konvene popularigas la Internacian Lingvon.

En la klubaj programoj por marto - aprilo menciindas prelego de s-inoj Krpelová kaj Milatová pri ilia vizito al Ateno, renkontiĝo kun la japana gasto Hiroaki Miwa, kaj diskuto pri la Esp.-movado en Ostrava post 1925.

**P L Z E Ň** - La 30an de januaro estis la jarkunvena tago. La prezidanto de LG, V. Pechoč, parolis pri la signifo de Esperanto por la tutmonda paco. M. Turková, la sekretario, rememoris la datrevenon de V. I. Lenin kaj V. Chalabalová raportis pri la klubaj biblioteko. Fine parolis F. Kříž pri la agadplano de LG en 1974. /kž/

**P O L I Ĉ K A** - Ĉe la jarfina sesio de la Unuiginta Klubo de Laboruloj, kun la ĉeesto de lokaj kaj distriktaj autoritatuloj, la Esp.-rondeto estis premiita pro

sia ĝisnuna aktiveco per la diploma. Ing. B. Štefek resumis ĉe tiu okazo la rondetan agadon kaj skizis la taskojn venontajn.

Lastatempe prelegis por 130 persona publiko akademiano K. Pič el Litomyšl pri sia vojaĝo tra Kanado.

**Š U M P E R K** - LG ĈEA ricevis formalan promeson, ke ĝi estos akceptita en la Nacian Fronton. La grupo proponis al la Loka Nacia Komitato inaŭguri la straton de L. Zamenhof.

## PORPACA EKSPozICIO

Esperantista Klubo ĉe Uzina Klubo de Uranové doly Příbram organizis inter la 19a kaj 24a de marto la IIan priesperantan ekspozicion en la urba ekspoziciejo sub la devizo Por la paco, amikeco kaj interkompreniĝo.

## KRONIKO

Oldřich V a n ě k, longjara esperantisto el Šumperk, aĝa 70 jarojn, mortis la 14an de febr. post suferiga malsano.

Forpasis la 4an de jan. en Plzeň s-ro Václav S k á l a, aĝa 74 jarojn, esperantisto depost 50 jarojn.

La 13an de febr. forlasis niajn vicojn s-ro Jan U r b a n el Pardubice.

Honoron al ilia memoro !

**DARY NA TISKOVÝ FOND.** V. Bouchnerová, Nová Paka, 26 Kčs, J. David, Prostějov, 20, J. Vítovec, Vodňany, 2, O. Kola, Prostějov, 2, Dr. Vybíralová, Praha, 15, F. Mančík, Vyškov, 22, Dr. Doležalová 50, Č. Šlapák, Praha, 15, M. Bartoš 15, J. Pokorný, Hořice, 5.

Všem dárcům srdečný dík !

**PROSPEKTON PRI LIPTOV** /meza Slovakio/ kun esp. teksto eldonis Okresný národný výbor, 031 41 L. Mikuláš, ČSSR, kunlabore kun ER ĉe la Muzeo de j. Král. Sendu dankesprimojn k postulu pluaĵojn!



## FILATELISTOJ INTERNACIE

Enkadre de Federacio de ĉs. filatelistoj laboras jam ekde 1969 la "Esperanto-sekcio", kies membroj popularigas Esperanton inter siaj gekolegoj per la kolektoj kun Esp. temaro. La plej bonan posedas D. Bartošík el Prago. Lia kolekto "Historio kaj nuntempo de Esperanto" gajnis entute 6 orajn /kun honor-premioj/ kaj 7 arĝentajn medalojn, i.a. ankaŭ en la tutmondaj filatelaj ekspozicioj, laste en Poznań, 1973.

La alian kolekton - "Esperanto en filatelo" - kiu gajnis ĝis nun 7 arĝentajn kaj 4 bronzaĵajn medalojn, posedas prezidanto de la Sekcio, V. Hasala el Raškov.

Ambaŭ kolektoj oni povos vidi en Brno, kie en la tagoj 8.-23.6.74 okazos la tutŝtata ekspozicio de poŝtmarkoj "Brno 1974" kun internacia partopreno. Inter la 6-a kaj 8-a de septembro 1974 okazos en Opava regiona ekspozicio de p.m., kie kunsidos ankaŭ la anoj de "Esperanto-sekcio". Oni povos rigardi kelke da kolektoj je la temo "Esperanto" kaj en la ekspozicia katalogo legi du artikolojn pri la Esperanta filatelo.

-espo-

### IL kaj la socialistoj

Kiel konate, Itala Socialdemokrata Partio /PSDI/ proponis al la Socialisma Internacio la adopton de Esperanto kiel unuiga lingvo por la socialismaj partioj kaj por la laborista movado.

Tiun ĉi fakton rezultigas la klopodoj de A. Menabene el Romo, kiu kun helpo de la esperantistoj el diversaj urboj sukcesis unue voĉdonigi la provincan membraron pri la proponita rezolucio kaj poste sendigi ĝin al la partia estraro. De tie ĝi estis sendita al la Socialisma Internacio por pridiskuto. La respondo de H. Janitschek, ĝenerala sekretario, estis jesa...

Por vekti intereson pri Esperanto A. Menabene atingis, ke la sekcia sekretario en la roma kvartalo aranĝis prelegon kaj debaton pri Esperanto per deputito F. Nicolazzi, la unua subskribinto de la legpropono, kiu antaŭvidas la instruadon de Esperanto en la italaj lernejoj.

laŭ Pilo-Press

OKAZE DE LA SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO ni sendas al vi persone kaj al la legantoj de STARTO elkorajn salutojn kaj bondezirojn. Regu la paco sur nia terĝlobo! Nur en la mondo sen militoj estas ebla progreso kaj disvolviĝo de kunlaboro kaj amikeco inter la popoloj. Vivu la amikeco trans limojn! - Subskribitaj anoj de la Riga Esperanto-Klubo.

Similan saluton sendis ankaŭ Havana Esperanto-Rondo, Kubo.

AL PRINTEMPA ESPERANTISTA RENKONTIĜO en Tatranská Lomnica, Altaj Tatroj /26.-28.4.74/ invitas Asocio de esperantistoj en SSR kaj EK Košice. Kotizo 250 Kčs /220 por studentoj/. Informoj ĉe EK Rooseveltova 5, 040 01 Košice.

INTERLINGVISTIKA SCIENCA RONDO DE STUDENTOJ de la Varsovia Universitato estas aranĝanto de Studenta Interlingvistika Seminario en Varsovio /1.-5.5.74/ Skribu al Socialistyczny Związek Studentów Polskich, Warszawa, Krakówske Przedmieście 24.

ESPERANTO-SOCIETO "VEKIĜO" p.k. 60, Sumen invitas ĉiujn amikojn, vizitintajn Bulgarion, skribi siajn impresojn. La leterojn oni laŭtleĝos ĉe la letervesperoj en majo kaj aŭgusto, okaze de la 30-jara jubileo de la socialismarevolucio en BPR. Al la partoprenontoj estos aljuĝitaj premioj.



# Ni legis...

Pío Baroja : LA ARBO DE LA SCIADO. El la hispana tradukis F. de Diego. Aŭtoro- kaj verko-prezento de Juan Régulo Pérez. Eldonis STAFETO, 265 p. kaj 18 p. enkondukaj, 16x22 cm.

La libro kunmemoras la centjaran naskiĝ-datrevenon de la plej granda hispana romanisto de la 20a jarcento/Gis tie ĉi la vortoj de la eldonisto/.

La internacian leganton la libro verŝajne repensigos pri la angla romano CITADELO de Cronin, ĉar temas ankaŭ pri kvazaŭ-biografio de juna medicinisto, renkontanta amason da gravaj malfacilaĵoj tuj ĉe la komenco de sia kariero de praktika kuracisto. La ĉefaj estas eĉ tre similaj - la burokratio de urbaj aŭtoritatoj, malklereco de la pacientoj, monavido de la kolegoj ktp.

Tamen la reago de ambau ĉefrolantoj estas tre malsama. La anglo batalas arde kaj obstine, sen respekto al personaj damaĝoj, kaj finfine, kiam li neniel povas atingi, ke la urbestro rekonstruigu la difektobaven kloakon, el kiu disvastiĝas la infektado, li ĝin propre manemane eksplodigas per dinamito. Aliflanke la hispano, D-ro Andrés Hurtado, vidante la malbonaĵojn ĉirkaŭ si, suferas, plendas, ploretas, sed ho ve, faras nenion. Finfine li venenas sin pro la grava dilemo, ĉu edziĝi aŭ ne.

La traduko estas bone legebla kaj komprenebla, tamen ĝi enhavas sufiĉe multe da eraretoj. En la eldonaĵoj de STAFETO oni kutimas legi pli perfektan lingvon. Felix

## Korespondi deziras

HUNGARIO - J. BELEZBAI, 2800, Tatabánya, Györgiu 16, T. Kovacs 2318, Sigel-szentmarton, Orvos-köz 7s; E. SOS, H-90 - 25 Győr Achim Anoras ut. 64/B; E. LEDO, H-9025 Győr Gyepszél ut. 76; B. PÉCS, 9651 Nagysimonyi, Jókai u. 44;

J. KORONCZI 9731 Koszeg Felső krt. 4; G. ALMASI 13j. 9021 Győr, Jókai u. 1317

POLLANDO - W. MALINOWSKI, ul. Tuwima 28/6, 59-902, Zgorzelec; f-ino E. SULIMA, EK Polna 20/11, 19-300; M. POROWSKI, 28j. ekon., 45-774 Opole, ul. Danbonia 133/15


LITOVA SSR - B. KIRIS, Palanga, K. Poželos 49-10, LTSSR-USSR; S. BARANAUSKAS, Klaipeda, M. Gorkia 23-3, LTSSR-USSR; A. KIVISTIK, 200034, Tallinn, Ed. Vilde tee 59-23; f-ino S. RUDYTĖ, Prienai 234 340, Tarybu 22-1; L. KLEIZAITĖ, Prienai 234 340 Melninkaites 81.

BULGARIO - A. I. TRIFONOVA, 14j. Otec Paisij 57, Bjala/RUSE/; D. MINCEV 36j., H. Angelov 6, Šumen; R. M. MUSTAFOV 17j., Graf Ignatiev 61, Jambol.

JUGOSLAVIO - La semajna magazino por knabinoj TINA publikigas Esp. kurson al kies 12-17j. legantinoj oni sendu leterproponojn: E.-kurso, YU 41 000 Zagreb, Ljibice, Gerovac 1;

DUTRAKA SONBENDO /9cm/ kun prelego pri Uzbekistano kaj 56 diapozitivoj prunteblaj kontraŭ kompenso de afr. ĉe A. Staŭura, Ĉkalovova 863/ /25, 708 00 Ostrava-Poruba. Ĉe la sama haveblas INTERSTENAĴOJ eldonitaj en Italio inter 1959-70, gvidiloj pri stenografio Esperanta, estona, greka, latina, germana, bulgara, pola, hispana, sveda, finna kaj konsiloj por multaj aliaj lingvoj. Skribu aldonante reafrankon!





## SIGNALILO

FERVOJISTA  
SEKCIO  
DE ĈEA

IFES EN MARIBOR. Meze de januaro okazis en la montaro Pohorje apud Maribor la 15a Internacia Fervoja Skisemajno/IFES/, kiun partoprenis 32 esperantistoj el ses landoj. La organizanto, la Fervoja E.-Societo Maribor, eldonis porokazan libreton, kie troviĝas informoj pri la sportaj aktivecoj de IFES k.a. La programo konsistis el skiado, skikon-

kuroj, vizitoj al la fervoja montardomo kaj al Maribor. La loka gazeto "Večer" kaj la Esp.elsendado de la radiostacio Zagreb raportis pri la aranĝo.

LA 15a EŬROPA FERIOSEMAJNO EN SVISLANDO/EFS/ efektiviĝos inter la 22a kaj 28a de sept.1974 ĉe la bordo de la Lugano-lago. Informoj ĉe E.Glattli, Larstr.17.CH-5200, Brugg, Svislando.

ESP.-KURSON por dek fervojistoj en Dĉĉín gvidas s-ro Toman.

ĈIU TRIA VARVAGONO konstruita en Sovetio devenas el la vagonfarejo en Niĵnij Tagil. Antaŭnelonge oni konstruis la unuan kvaraksan boĝivagonon por kies konstruo estis uzita aluminio. Ĝia ŝarĝkapablo estas je 3t pli alta ol tiu ĉe la similaj vagonoj produktitaj el ŝtalo.

LA PLEJ ALTA FERVOJPONTO en Eŭropo troviĝas proksime de la makedonia ĉefurbo en Jugoslavio. La plej altaj pilieroj estas 200 m altaj.

EN 1976 ESTOS FINKONSTRUITA la vaportrakcio sur la aŭstria fervojlinioj. Sur la ĉeflinioj servos alternkurentaj elektraj lokomotivoj produktitaj en Aŭstrio aŭ en Svedio, sur la akcesoraj linioj funkcios la dizelmotoraj.

LA LOKOMOTIVFABRIKO en Kolomna, proks. de Moskvo, konstruis la novan dizelelektran lokomotivon TEP 70. Kun siaj 4000 ĉevalpovoĝi ĝi estas la plej forta lokomotivo iam produktita en USSR.

## TS ĈEA atentigas

Antaŭ ol publikigi originalajn tekstojn aŭ tradukojn el la teknika fako, oni nepre konsultu Teknikan sektion de ĈEA. Pri konstru-ingenieraj aferoj turnu vin al inĝ. J.Werner, Kroftova 84,616 00 Brno 16, pri ĥemio al inĝ. Z.Pluhař, ul. 5.kvĉtna 38, 550 01 Broumov, maŝin-ingenierion konsultu ĉe inĝ. K.Faltejsek, U Nových domů II/529 140 00 Praha 4. La terminarajn laborojn gvidas inĝ. A.Bednařik, Lotyšská 8, 834 00 Bratislava 34. En aliaj aŭ dubaj kazoj petu konsilon ĉe inĝ. J.Werner aŭ inĝ. Pluhař.

INTER LA LIBROJ pleje vendataj ĉe la Libroservo de UEA en 1973 estis ankaŭ du publikaĵoj eldonitaj en ĈSSR: Poŝatlaso de la

mondo en E-o kaj Paŝoj al plena posedo de W.Auld.

PETICIO PRI ENKONDUKO de Esperanto en lernejojn estis oficiale akceptita en la japana parlamento. La projekton pri enkonduko de IL pristudos la ministerio de edukado.

SALUTO DE W.BRANDT. La Federacia kanceliero W.Brandt, Nobelpremiito pri paco, konsentis saluti la Universalan Kongreson per mesaĝo presota en la Kongresa Libro.

Ĝis la 27a de marto aliĝis al la 59a UK en Hamburgo 1055 personoj.

EG en Dresdeno organizas ekspozicion okaze de la 25a datreveno de la fondiĝo de GDR. Sendu salutajn al E.Berndt, Helgolandstr.9b.

ONI INTERESIGAS pri la starigo de novaj psoriazaj asocioj per E-o. Persono, kiu estas preta transpreni tiun taskon en ĈSSR, skribu al: K.J.Hadler, Croft House, The Croft, Hastings, Sussex, TN 343 HH, Britio.



"Ĉu vi jam scias, Petro?" kaptis lian kubuton Karlo. Enpensiginta Petro eĉ ne aŭdis rapidajn paŝojn de sia amiko, kiu hastis por interdividi impresojn pri la novaĵo. Ne, Petro sciis ĝis nun nenion pri la okazintaĵo, kiu ordigis la kvietan nivelon de ilia filumenia klubo.

"Kial? Ĉu vi ne aŭdis ankoraŭ pri la malkovro de la Ora Leono?"

"Ĉu la Ora Leono? Kio estas la Ora Leono, mi petas vin?"

"Dio mia, li vere ne scias! Do aŭskultu: antaŭ kelkaj tagoj nia klub-prezidanto vizitis la urbeton Mokrov. La alia kuzo aŭ alia parenco invitis lin, ke li pririgardu kelkajn malnovajn alumetetikedojn kaj skatoletojn, ke trovis ilin en la subtegmento dum la ordigo. Estis ĉe tio ankaŭ iaj paperoj kaj el ili la prezidanto eksciis, ke en la urbeto iam malfermis malgrandan alumetfabrikon iu Leo Nor. Li ne tro sukcesis, kompatindulo. Post kelkaj monatoj la brulego forvoris lian fabriketon. Evidente preskaŭ nenio savigis. Sed inter tiuj malnovaj alumetskatoletoj trovis la prezidanto ion tute nekonatan: sur unu estis etikedo kun Ora Leono. Ja ni konas hodiaŭ ĉiujn malnovajn markojn, sed la Ora Leono inter ili ne estas. La prezidanto longtempe cerbumis pri la problemo, ĝis fine li trovis: Leo Nor - Leono Ora, nur malgranda adapto de la nomo kaj jen oni havas la fabrik-markon! Vi povas imagi la ĝojon de la malkovrinto: teni en la mano unikaĵon! Ho trovi ankaŭ foje similan subtegmonton," suspiris Karlo. "Ne forgesu alveni vespere en la klubon" li ekkriis ankoraŭ trans la ŝultron, kurante al la tramo.

"Jes, trovi la subtegmonton, diras al si iom amare Petro, irante laŭ la kajo hejmen. Dum dektri jaroj mi ne renkontis ian raraĵon, pri la unikaĵo eĉ ne parolante. Ja kie? Kuzon en Mokrov mi ne havas kaj tiel simple sur la strato la unikaĵo kutime ne kuŝas.

"Senpense li piedfrapas alumetskatoleton, kiun li ekvidas antaŭ li. Ĝi kusas tiel, ke la etikedo ne estas videbla kaj per la piedfrapo li volas ĝin turni ne levante ĝin. Malnova kutimo ankoraŭ el la bubaj jaroj. La skatoleto efektive turnas sin antaŭ mirigitaj okuloj de Petro momente ekbrilas oro, sed dum la sekvinta momento la skatoleto saltas ankoraŭ foje, la frapo estis tro forta kaj ĝi falas en la riveron.

Granda Dio.- oro, leono, la Ora Leono! Sur la skatoleto estis la Ora Leono! Ĝi estis nur momento, tamen Petro la bildeton vidis klare. La koro de Petro haltas, li sentas, kiel lin surverŝas ŝvito pro la ekscito. Pli instinkte ol klarpense li kuras malsupren laŭ la proksima akvobarilo. Rapide, rapide - subite Petro stumblas kaj ankaŭ falas en la akvon....

Li vekigas kun la koro batanta, de ŝvito priverŝita, kvazaŭ li ĵus eklaviĝis. Fi, kia sonĝo! "Ŝajnas al mi, ke mi devos ĉesi la kolektaĵon, alie min trafos infarkto," li murmuris al si mem, viŝante sin, kaj poste li denove ekdormas.

Dum la hela tago li ridas pri ĉio kaj preparas sin vespere rakonti pri la sonĝo al Karlo. Kaj kiam li poste iras laŭ la kajo al la klubejo, li plezure piedfrapas alumetskatoleton, kuŝantan tiel, ke la etikedo ne estas videbla. La skatoleto obeeme turniĝas, montriĝas la etikedo kun la bildeto de la Ora Leono, poste ankoraŭ unu salto kaj la skatoleto malaperas en la ŝaumanta akvoturniĝo sub la akvobarilo..

En la lasta numero de la filumenia bulteno oni povis legi sciigon pri la sensacia trovo de dokumentoj pri la produktado de alumetoj en Mokrov, el kiu konserviĝis unu sola skatoleto kun la marko de Ora Leono. Sed la trovinto, prezidanto de la konata filumenia klubo, pro mal-feliĉa hazardo la belegan unikaĵon perdis....

/ La tria premio en la literatura konkurso de Starto, fako originala prozo /



1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12 13 14 15

A														
B														
C														
D														
E														
F														
G														
H														
I														

**K R U C E N I G M O** de J.Cink

**H o r i z o n t a l e :** A/ Sulko sur akvo-nivelo; per la mano igi eksteren ; konforma al la reguloj de beleco.- B/Kemia element'n-rolo kuraĝiga interjekcio; elekt'laŭ hazardo ; membr' ; intenca mortig'. - C/ UNUA PARTO DE LA SEKRETAJO /proverbo laŭ Zamenhof/. D/Parto de teatraĵo apartenanta al unuopa aktoro ; metafora; finaĵo de preterita gerundio.- E/Ruĝ-kvadrata karto-spec' ; eligado de harmoniaj voĉsonoj; virbov'. - F/Sovaĝa pork' ; la plej bezona fluidaĵ' ; folia arb' ĉe la akvo; numeralo; piede. - G/DUA PARTO DE LA SEKRETAJO.- H/ Posteul' ; propra ; prestiĝ' ; daŭra aŭ ripeta ; kemia signo de la plateno.- I/ Apartenanta al li ; mallongigo de akademia titolo; permana tren; kolosa; muzika son'.

**V e r t i k a l e :** 1/Frakcia sufikso; molpasta manĝaĵ' ; instrument-2/Negacia; hasti.- 3/Malagrabla impres'dum vundigo; subspeca;- Frato de la patro;kemiaĵ' devenanta de amoniako kaj gras-acido.- 5/Senokupitec' ; numeralo; numeral'.- 6/Batala; realeco.-7/Elig'de larmoj; ekstrema nan' ; - Stonego; kemia signo de taliumo; urbo en Cadio.-9/Stadi' ; akva kaj hejma bird' ; - 10/ Akva fein' ; senmaŝine. - 11/Likvaĵ' por skribi ; nedifinaĵo; prezent'de bildoj en menso.- 12/Kor-ligiĝant' ; farita el metalplato. - 13/Feroksida; mineral' uzata en farbofabriko; - 14/Supermezure; kontinento. -15/Latine "al"; ripeta kaj returna prefikso ; aŭtosigno de Tunizio.

**H e l p i l o :** D/Tropa, 4/Amid', 8/ Ati, 13/Isat', 15/Ad.

**S T A R T O** - eldonas ĈEA, Jilská 10, 110 00 Praha 1. Aperas okfoje jare. Respondeca redaktoro O. K n í ch a l. Red.rondo: inĝ. F. Sviták, J.Mařík, inĝ.E.Felix. - Dohlédací pošta Praha 07, sniž. pošt. poplatek povolen ŘP Praha j.z. P/1-2283/1971. Toto číslo bylo předáno tiskárně 10.dubna 1974.